P A C O kaj J U S T E C O.

Orgaan der E°-beweging:
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter : Drs. F ROOSE - J.& M.Sabbestraat, 12;-BRUGGE.
Advertentie: Secretariaat: ROOSE-DE KERSGIETER,
J.& M.Sabbestraat, 12;-BRUGGE.
Propaganda : Grégoire MAERTENS, Nieuwstraat, 54;-ASSEBROEK.
Postrekening nr:479170 van DE KERSGIETER H.,
J.& M.Sabbestraat, 12;-BRUGGE.

La Gildo de la Merioj. (Daŭrigo)

Ilia motivo estis ke en la kamparo ne estis eble tiel bone kontroli la fabrikadon kiel en la urboj. Do el la kamparo venos pli valtaŭgaj produktaĵoj. Tio estis fakte vera. Sed ankaŭ tio estis bela argumento por pravigi propran egoismon. Kaj kiam la tri grandaj urboj Brugge, Gent kaj Ieper estis vere fortaj ili sentigis siajn diktatoremajn tendencojn ne nur al la kamparanoj sed ankaŭ al ĉiuj aliaj urboj. Ekzemple en 1339 la tri nomitaj urboj devigas la urbon Sekloo fari la tolaĵkomercon sub kontrolo de Brugge. Ni ja ankaŭ scias kion Sluis spertis kelkajn jarojn antaŭe. Pro la sabloplenigo de la rivero "Sûin" estis pli kaj pli malfacile por la grandaj ŝipoj por atingi Brugge, kaj Sluis iĝis grava konkurencanto. Nu, je iu tago la Bruĝanoj faris ekskurson al Sluis kaj forbruligis ĝin komplete.

La gildoj ne ŝatis fremdajn varojn en propra urbo sed ili devis allasi, se ne, la fremdaj urboj ankaŭ ne allasus iliajn varojn. Por ĉio tio reguligo estis necesa. Tiun rolon plenumis la foiroj. Ili estis longedaŭraj kaj tuj post la foiro en iu urbo komenciĝis alia en alia urbo. Sed la disputoj ne nur okazis de urbo kontraŭ ekstero. En la urbo mem la anoj de iu metio inter si senfine interbataladis. Vi scias ke ĉiuj istoj de sama metio loĝis ankaŭ en sama strato. De tie venas la nomo de multaj stratoj ekz. budista strato, forgista strato k.t.p. Vi scias ja bone ke kiam ekz. du legomvendistoj, aŭ fisvendistoj loĝas iom tro proksime en la sama strato, ke ili ofte estas malamikoj. Imagu kio okazis ĉiutage kiam la urba popolo invadis unu straton por aĉeti tie la bezonaĵon. Plej multaj ordonoj estis necesaj. En Bruselo la armilistoj ne povis viziti la klientojn en la bierejoj (tie kie oni ofte bezonis armilojn (!)) por instigi ilin al aĉeto. Al la farbistoj estis malpermesata lokigi sian edzinon sur la strato por allogi la tolistojn (!!). En Gent neniu rajtis forkonduki al propra domo iun personon kiu staris antaŭ alia butiko. En Brugge oni eĉ ne povis krii al preterpasantoj. En Antverpeno oni devis malpermesi la renkontiron al klientoj. En Namuro estis ĉiam multaj soldatoj en la fortikaĵo. La bakistoj ekprenis la kutimon pruntedoni al ili ĉiuspecajn ilojn de domnastrumado kaseroloj, potoj k.t.p. Vespere, la soldatoj devis redoni kaj tiam, plejparte ili aĉetis ion en la butiko. Ankaŭ tion oni devis malpermesi. Oni scias ke antaŭ tiu-ĉi milito multaj fabrikoj donis al la butikoj diversajn donacojn pro faritaj mendoj. Jam en la mezepoko tio ekzistis, sed estis malpermesata. Montri siajn varojn en alia domo, ekz. de familiano estis alia ebleco, sed ankaŭ baldaŭ venis malpermeso. De tiam datumas la publikaj vendejoj kaj ankaŭ la diversaj vardomoj: buterdomo, vianddomo, tolaĵdomo k.t.p. Fakte konkurenco nur estis ebla kaj permesata per plej taŭga produktaĵo. Bonega principo!

VII. La Gajno.

Oni ankaŭ zorgis ke iu ne tro gajnis en malavantaĝo de alia. Tial oni fiksis la nombron de la fabrikiloj kiujn ĉiu "Majstro" rajtis posedi kaj tiuj iloj devis stari ĉiuj en la sama laborejo. La "trovantoj" venis kontroli. La daŭro de la laborado estis fiksita.xDum somero dekunu. Finiĝo kaj komenciĝo de laborhoro estis montrita per labor sonorilo kiu plejparte estis la parohosonorilo. Ne imagu ke dum somero labortagoj de dekunu horoj estis tro longaj. Tute ne. Ne ankoraŭ ekzistis tiu moderna kutimo ke post ĉiu labortago oni postuklis iun distriĝon. Tio ne ankoraŭ ekzistis. Post laboro, oni serĉas.... laboran okupon. Dum nokto, dum dimanĉo kaj dum festotago estis malpermesate labori. Kaj en la mezepoko, en tiu religia epoko, estis multaj festotagoj. La nuntempaj tiel nomataj afgestelde=aboliciitaj sanktulaj tagoj estis tiam grandaj festotagoj.

.../...

x Dum vintro oni laboris ok horojn pro tago !

Jam ekzistis la tiel nomata angla semajno. Dum sabato posttagmeze oni ne laboris.

Infanoj ne laboris. Okazis ke virinoj laboris. Sed ne ĉie. Kaj ne en ĉiu metio.

Kiam fremda komercisto venis kun krudmaterialo (=grondstof-matières premières) antaŭ ol oni povis aĉeti, ĉiuj gildanoj aŭ metianoj devis esti avertitaj per iu gildoknabo kiu devis ĉie diskonigi la novaĵon.

Kaj finfine, alia rimedo por gajni pli ol la aliaj estis eble vendi je pli altaj prezoj. Ankaŭ tio estis malpermesita. Ekzistis longaj listoj kun fiksitaj prezoj! Ekz. unu de la konservitaj listoj mencias 57 mebla̧joj. Nu, por tiu epoko, en kiu oni ne ankoraŭ konis la nunan lukson, tio estis verŝajne kompleta.

VIII. Politika funkcio.

Kiam la metio estis komplete organizita, ĝi konstruis propran kunvendomon, ĝi havis propran flagon kaj propran sigelon por subsigni oficialajn dokumentojn. Ĝi postulis politikajn rajtojn, lokon en la urbestrado k.t.p. Ili zorgas pri milita eduko de la junuloj en sia metio. Tiam venis la rivaleco kaj ĵaluzeco inter la metioj. Militoj inter metioj estis precipe oftaj kaj akraj en Gent. Precipe en la dua duono de la dekkvara jarcento kiam ekonomiaj krizoj okazas en Flandrujo kaj kiam precipe la metioj multe suferas pro tiuj krizoj. Antaŭe, la metioj estis donintaj tre gravan helpon al la Grafo de Flandrujo en la batalego kontraŭ la Franca reĝo. Sed ankaŭ ofte la metioj ribeliĝis kontraŭ la urbestraro kiu ne volis allasi aliajn personojn en la estrado.

IX. Festoj.

Ĉiu metio havis propran sanktulon-patronon. Ankaŭ tio variis de urbo al urbo. Sed preskaŭ ĉie la patrono de la forĝistoj estis S[ta] Eligio kaj tiu de la ĉarpentistoj estis S[ta] Jozefo. Faradistoj havis en multaj urboj la Sanktan Katarinan. La teksistoj havis en Brugge la Sanktan Nikolaon kaj en Gent la Sanktan Jakobon. La buĉistoj havis en Brugge unue la Sanktan Benedikton kaj poste la Sanktan Livinon. En Gent estis la Sankta Huberto. La nomtago de la Sanktulo estis la granda festotago de la metio. Vespere antaŭe ĝi estis memorigata al ĉiuj per sonorilado de la preĝejaj sonoriloj. Matene la festo komenciĝis per solena Sankta Meso. Tio okazis ofte en la propra kapelo. Efektive al la ekstera rando ĉirkaŭ la mezaĝaj preĝejoj estas malgrandaj kapeloj. Tiuj kapeloj estis konstruitaj de iu metio. Multaj metioj havas propran pastron kiun ili pagis jare, por diservi ĉiutage en la propra kapelo kaj por anime prizorgi la familiojn de la metio. Tamen ne ĉiuj metioj estis sufiĉe riĉaj ke ili povis al si permesi tian lukson. Sed eĉ kelkaj metioj havis tute apartan kapelon. Vidu ekz. la kapelon de la forĝistoj en la forĝista strato en Brugge. Post la solena meso okazis ofte procesio. Ĉiuj estis en dimanĉaj vestaĵoj kaj estroj de la metio portis siajn honorsignojn. Kaj poste estis malpli religiaj ceremonioj.

X. Materia vivo.

Dum la glora epoko de la mezaĝo, ĝis la duono de la dekkvara jarcento ĉirkaŭe, ni scias ke la metiistoj havis bonan vivon. Ne utilas diri kiom ili gajnis. La interesa fakto estas ĉu oni povis multe aĉeti per la mono. Kaj efektive tia estis la situacio. Kiam pli malfrue la situacio plimalboniĝis la gildo de la metioj devis pli kaj pli subteni siajn malriĉajn gesnojn kaj konstrui pli kaj pli da "Diodomoj" por la maljunaj geпatroj aŭ gevidvoj. Malgraŭ ĉio restas certa la fakto de la glora periodo de la mezaĝoj ankaŭ estis la bona epoko por eĉ la tre simpla metiisto.

Drs. Fernand Roose.

&-&

Oorsprong van de kunst.

Het innerlijk leven van de mensch, t.t.z. het onstoffelijke in hem, waarop het stoffelijke wel invloed uitoefent, maar die het noodzakelijk bepaalt, is zijn gevoel- en redeneeringsvermogen. De eerste notie van den mensch is gekomen uit het subjectieve bewustzijn...hij voelde dat hij bestond, en hij merkte op, dat er iets was buiten hem. Intuitief werd zijn gevoelsopinie over het opgemerkte gevormd in hem... Dan volgden verdere gewaarwordingen, en de vergelijking met iets dat vroeger opgemerkt is geweest... De twee beelden schuiven over elkander... De mensch herinnert zich zijn vroegere gevoelsopinie, den indruk vroeger ontvangen...hij verbindt de gegevens, en de bepaling staat voor hem.(1). Uit dezen tak van het subjectieve menschelijk bewustzijn groeide door de gansche geschiedenis van het geslacht de wetenschap in een ...../...

staag voortbouwen op de herinnering van de voorouders... De bepalingen vloeiden uit het opmerken en de eerste gevoelsopinies werden tot begrippen... Werden de grond van andere bepalingen en begrippen... De mensch vergeleek en kwam tot redeneering, tot wetenschap... tot hetgene hij objectiviteit noemde...

Tegengesteld aan het "objectieve" in hem staat het subjectieve, het innerlijk gevoelsleven... hetgene ieder individueel bezit...gevoelen, antipathiën, sympathiën en verlangens...

Tot de diepste kern van het menschelijk zijn hoort het verlangen, het "Heimwee naar den oorsprong". De gansche eigenlijke wijsbegeerte is er op gebaseerd en het gevoelsleven van den enkeling wordt er meestal onbewust, totaal door bepaald. Beseft de mensch dit, dan leidt zijn innerlijk gevoelsleven hem tot den heiligen schroom van het onbekende niet voor te stellen oneindige... bij sommigen is dat verlangen sterk en schrijnend.... De kunstenaar spreekt het uit....

(1) Dat schijnt absurd... maar: wat is wetenschap anders dan redeneeren.. en steunt redeneering op iets anders dan vergelijking ?... en wat is vergelijken anders dan opmerken...?

A. Claeys.

§=§

Vlaamsche Esperantisten, uw blad is

F L A N D R A   E S P E R A N T I S T O

uitgebreid, actueel, interessant, veelzijdig, goed ingelicht.

Uitgegeven door Flandra Esperanto-Instituto V.z.W.
Instelling voor Esperanto-Onderwijs & Propaganda.

Redactie & Administratie: P.Van Humbeeckstraat,5,BRUSSEL-WEST.

Losse nummers: 5 FR. Abonnement tot einde 1945 (8 Nrs) 36 FR.
Postrekening 3268.51 van F.E.I. BRUSSEL.

§=§

Moderna Fabelo.
SOSOSO = Sekreta Stranga Stultaĵo...

Inter grandaj, dangerplenaj montoj, kuŝis lando en varma valo... Nur vivis feliĉaj homoj tie, kaj la reĝo eĉ havis ridoton sur la vizaĝo...

Iun tagon venis al li kelkaj enloĝantoj kaj ili salutis lin kaj diris: "Reĝa Moŝto, nia lando ekfloras en paco, kaj la homoj estas feliĉaj tie-ĉi sed ĉiu lando havas policon... nur la nia ne posedas,... laŭ nia kredo, tio estas manko..."

Kaj la reĝo miris, kaj li diris: "Kial ni devus fakte posedi policistojn.., ĉiuj estas bonaj... neniu devas sin kaŝi por la aliaj... mi vere ne scias, kial oni devus ekestigi tiem..."

Kaj la aliaj rigardis al la grundo kaj diris: "Ho, Reĝa Moŝto, estas nur tio,... ni volas nin mem kaŝi por la aliaj, ke ili ne eksciu niajn proprajn agojn..."

A. Claeys.

^^^

POEZIO.

Pro Justitia.

Een kleurtje, een deuntje,
een wimpel, joechei!
Een fatiek met 't gezicht
van een oorwurm, joechei!

Een draaimolen knalrood,
met een wiegende tango, joechei!
Vanmorgen wachtte de dood
hier een salvo, joechei...

Een klient voor het Huis van Arrest
werd gevat, joechei!
En 'k vervloekte de dood als de pest
dat hij dien vergat... O God...

Van.

Beste lezer verstaat ge dat gedicht ? Lijkt het u zinloos ? Het is schrijnend! Ja, met al die Hjoechei's! Wat beteekent het dan ? Niets en veel. Het geeft een gemoedsgesteltenis weer. De auteur ziet op het zelfde oogenblik voor zich het meest tragische gebeuren en vlak daarnaast de menschelijke dartelheid in uitspatting. En het is niet de eerste maal dat hij dat ziet, want dan zou zijn gemoed geheel anders spreken. Maar het is misschien de 20ste maal of meer, of misschien ziet hij het alle dagen. En de pijnlijke gespletenheid die zooiets veroorzaakt, de geweldige zwaarte waarmede zooiets het gemoed bedrukt, is niet altijd voort draagbaar. Na een tijd moet men die last afwerpen want men zou krankzinnig worden. Welnu op zoo'n moment was de auteur nu gekomen toen hij dat gedicht, waarschijnlijk in één geut, eruit flapte. Niet meer redeneeren en niet meer voelen. Het leven, dat buiten mij om gaat en mijns ondanks, speelt met alles ook met het meest tragische, dat allerhardvochtigste leven! Maar de "fond" van de auteur -hij blijft toch wat hij van zich zelf gemaakt heeft - priemt toch even door heel op 't laatst.

De Redactie.

La redakcio parolas:

1) "Monnikerede". Iemand heeft enkele zeer interessante bemerkingen ingestuurd over het hoofdartikel dat in ons laatste nummer verscheen. Maar waarom liet hij noch naam noch adres kennen ? Steller van hoogervermeld artikel zou graag met hem daarover van gedachte wisselen. Wij kunnen onmogelijk alle pennetwisten daarover opnemen. Plaatsruimte is helaas te beperkt. Maar graag zullen wij de besluiten van de gedachtenwisseling publiceeren.
2) De ooren van de redactie hebben volgende uitspraak van een onzer leden opgevangen: "Er is geen Duitsche muziek! Muziek is muziek". Alloh! een interessant onderwerp om over na te denken en om van gedachte te wisselen. Wie pakt het aan ? Dat betreft natuurlijk ook gansch de kunst. "Du choc des idées jaillit la lumière" heeft Blaise Pascal gezegd. En het is niet uitgesloten dat wij voor goede inzendingen premies geven!
3) Nova Internacia Lingvo!

YUNIVERSAL LANGUIJ.

La "Daily Herald" de 27-Aûg.1945 sciigas al ni ke iu Dr M.Follick nova parlamentano propagandas por iu reformita Angla lingvo kiel internacia lingvo. Tie-ĉi sekvas redaktaĵo de li en Angla kaj poste en reformita Angla lingvo.

"The United Nations' Charter has been signed by fifty nations all having a common interest in the maintenance of peace. However, in the discussion over 155 expert linguists were required to interpret the discussions, and a host of others who were not so expert.
If a universal language existed, these discussions could be held round a table where everybody could understand what everybody else had to say without having to resort to individual interpreters to find out what the matter was all about.
An instance of the drawback of this description of cross-interpretation and the misunderstanding that can thereby arise is the fact that I formed part of a commission that once went to Paris to interview Mr.Jouhaux, Mr.Dobbie, M.P., was one of our group.
One of the answers was so incorrectly interpreted that I had to step in -I was not there as an interpreter- and explain to Mr.Dobbie and the interpreter, that his understanding of the answer was totally incorrect.
And thus international misunderstandings arise.
By the use of an international language universally spoken such a misunderstanding could never occur."

Jen la traduko en Esperanto:

"La kontrakto de la unuiĝintaj ŝtatoj estas subsignita de kvindek nacioj kiuj havas ĉiuj komunan avantaĝon en daŭra starigo de paco. Dum la diskutado al cent tridek kvin spertaj lingvistoj oni demandis por traduki la diskutojn kaj al armeo de aliaj lingvistoj kiuj ne estis tiel spertaj. Se universala lingvo ekzistus (ĉu ĝi ne ekzistas?=noto de la redakcio) ĉiuj diskutoj povus okazi ĉirkaŭ tablo kie ĉiu povus kompreni kion ĉiu alia devas diri sen ke li devus domandi helpon al apartaj tradukantoj por ekscii pri kio fakto temas.(ĉu la aŭtoro pensas ke li estas originala? Antaŭ li, milionoj kaj milionoj da homoj jam liris la saman=noto de la redakcio). Ekzemplon de la malavantaĝo de la priskribo de interkruceantaj tradukoj kaj de la miskompreno kiu povas tiel ekesti liveras la okazo kiam mi estis unu de sendit*aro kiu foje ..../...

(Sekvo sur paĝoj 6 kaj 8.)

jen la Estraro.

La estraro komunikas al la legantoj ke la gvidado de la revuo konsistas el sepopa redakcio:
1. La Prezidanto, Sinj.Roose F.,J.&M.Sabbestr.12,Brugge.
2. Sinj.Norro A., Coupure 33, Brugge.
3. Sinj.Debaets Et., Vrijheidstr. 2, Assebroek.
4. Sinj.Maertens Gr., Nieuwstr. 54, Assebroek.
5. Sinj.Callewaert O., Genthof 31, Brugge.
6. S-ino Roose-De Kersgieter H.,J.&M.Sabbestr.12,Brugge.
7. Fraŭlino Roose M.-Th., Guido Gezellelaan 15, Brugge.

La Redakciosekretoj estos konservataj ĉe la Prezidanto.(Ekz. la pseŭdonimoj de la kunlaborantoj.)

- - - - - - - - - - - - -

La estraro gratulas tiun-ĉi monaton jenajn membrojn pro ilia naskiĝtagreveno:
1.Sinj.Norro A.,la organizinto de nia grupo kaj revuo,naskita la 2.9.1921.
2.S-ino Iserentant-Schepens Blanche, la kara edzino de nia sekretario, naskita la 7.9.1918.
3.Sinj.Iserentant Roger, nia fidelega sekretario, naskita la 10.9.1914.
4.Fraŭlo Stalpaert Emiel, kiu estas la plej feliĉa de la tuta listo, ĉar li estas la plej juna, naskita la 16.9.1925.
5.F-ino Roose M.L.,ankaŭ tre fidela membro de nia grupo,naskita la 19.9.1920.

- - - - - - - - - - - - -

En niaj propagandomaterialoj troviĝas ankoraŭ 2 ekzemplaroj de la famkonata verkaĵo: La Tragedio de l' homo de EMERIKO MADACH, el la Hungara originalo de K.Kalocsay, kun 20 desegnaĵoj.
PREZO 40 Fr.

- - - - - - - - - - - - -

Cirkaŭ la Mondo.

Nederland.

Het Esperanto huis en -gedenkteeken te Arnhem ongedeerd.

Door een ooggetuige werd bevestigd dat buiten wat schade aan vensters, deuren en dak het Esperantohuis te Arnhem ongedeerd bleef. Eveneens werd het Esperanto gedenkteeken gespaard.

Na de harde gevechten die daar geleverd werden, door alle Esperantisten met benepen hart gevolgd, zal dit nieuws voor allen een opluchting en vreugde zijn.

Engeland.

Gedurende den ganschen oorlog werd het jaarboek van I.E.L. en het tijdschrift "ESPERANTO INTERNACIA" regelmatig uitgegeven.

Lidmaatschap bij I.E.L.kan voor 1945 verkregen worden onder volgende voorwaarden:
MJ(Membro kun jarlibro). . . . . 35 fr.
MA(Membro kun Esperanto Internacia & Jarlibro. . 70 fr.
MS(Membro Sub. . . . . 180 fr.
te zenden aan:
S-ro G. Van den Bossche, Oostenstraat 26, ANTWERPEN.

Brazilie.

Het 10e landelijk Congres dat plaats greep in April 1945 te Rio de Janeiro was een waar sukses. Eer-prezident was Dr G.Vargas, Prezident der Republiek.
Door het postbeheer werden twee Esperantopostzegels uitgegeven, één er van draagt het beeld van Dr.Zamenhoff.

.../...

Redaktie: Fons Norro, Coupure 33, Brugge.

GRUPA VIVADO.

La spionoservoj kiujn mi menciis en la lasta kroniko pli multnombriĝis de kvar ĝis ses! Terure. Germanujo kun la Gestapo estas bagatelo en kompare je nia grupo kaj la ses policoj. Ilia agado etendiĝis ĝis malproksime ekster niaj landlimoj. Sed post tiu apogeo...subite nenio plu. Nia prezidanto foje klarigis en iu paroledo ke ĉio kio havas rapidan progreson ankaŭ havas rapidan malprogreson, kaj ĉio kio havas malrapidan progreson ankaŭ havas malrapidan malprogreson. Estas unu de la leĝoj en la historio.

La milito estas for, sed bedaŭrinde ne ankoraŭ estas paco. La amikoj de hieraŭ estas la malamikoj de hodiaŭ. Post kiam oni kune batalis kontraŭ io, oni inter si batalas. Kiam ne plu estas gravaj aferoj por dikuti, oni disputas pri bagatelaĵoj. Tia bedaŭrinda spirito tiom ekregas la tutan mondon ke eĉ en nia grupo ĝi sentiĝas. Du membroj faris bedaŭrindan agon kaj havis bedaŭrindan konduton. Ne ekzistas plu multe da espero ke tiu afero reenordiĝos.

Nia agado. Ni notis paroladon de S-ano Jo Lips, nova aktiva membro kiu jam havas meritojn.

En iu duonhazarda kunveno en la hejmo de la prezidanto, la ĉeestantaj gemembroj demandis pli da lingvoj ekzercadoj. Tiu danĝera demando ne mankis efikon. En la posta kunveno ni havis longan kaj larĝan klarigon pri iu gramatika punkto + pezan taskon. En la sekvinta kunveno, nova klarigego pri la sama punkto nun kaŭ la "Plena Gramatiko" de Kalocsay kaj Waringhien! Aĥ kaj ve! Kaj alia pli peza tasko estas promesita por la venonta kunveno!

Malrapide nia grupo iĝas fama en pli kaj pli vasta rondo. Speciale taksata de ni estas la donaco al nia grupo kiun donis la "London Esperanto-club" al kiu ni sendis dankleteron.

Kiel ni antaŭvidis, la reveno de niaj du fervoraj samideanoj Tt. De Baets kaj Grég. Maertens havis bonegan efikon en la grupo kies agado estas nun denove pli vigla.

Baldaŭ venos en nia grupo kelkaj gekursistoj kiuj faros ekzamenon kaj kiuj estos esperebla tre bonaj aktivaj gemembroj. Pro ilia aĝo, tio ne estas tute sen danĝero. Oni fakte povas diri ke tri generacioj estos tiam en la grupo. La bonaj interkompreno kaj interkonduto inter la du nunaj generacioj estis kompleta. La sama povos nun re okazi sed necesos multe da delikateco, multe da takto. La respondecaj estraranoj ne estas sen iom da malkvieto pri tio, kaj ili devos bone atenti.

La malbona vetero nin kelkajn fojojn fortenis de la maro. Ni esperas ke ni tamen ankoraŭ povos iri tien, ĉar ni tiel bone amuziĝas tie. kaj la malbona sezono tiel longe daŭras!

(Daŭrigo de paĝo 5)

Revuoj.

FLANDRA ESPERANTISTO: Redactie en Administratie: P.Van Humbeekstr.3, Brussel-West. P.C.R 3268.51 van F.E.I. - prijs 5 FR.
Inhoud Julinummer: Quo Vadis ? - Paul Otlet overleden - Esperanto levende taal - Onze groote kans - Nieuwsdroppels - Observoj - La studento - Nia Literatura konkurso - Van hier en elders - Esperanto puzzles - Jaĥto veturas el...(kriminalromano).

Wij beluisteren de Esperanto Radio Uitzendingen:
den Zondag.
Lille P.T.T. 248 m. van 9u15 tot 9u30.
den Vrijdag
B.N.R.O. Kortrijk 225,5 m. van 21u tot 21u15.

.../...

(Daŭrigo de paĝo 4)

kiu foje iris al Parizo por intervjui S-ron Jouhaux. S-ro Dobbie, parlamentano, estis unu de nia grupo. Unu de la respondoj estis tiel malĝusta tradukita ke mi devis interveni -kvankam mi ne estis tie kiel tradukanto- kaj klarigi al S-ro Dobbie kaj al la tradukanto ke lia kompreno de la respondo estis tute malĝusta. Kaj tiamaniere internaciaj miskompronoj ekestas. Per la uzo de internacia lingvo ĉio parolata, tia miskompreno neniam povus okazi."

"Dhe Yunaited Neishun's Tscharter has bien sained bai fifti neishuns eol having ei komun interest in dhe neiatinans ov pies. Hauever, in dhe diskushun ouver 135 ekspert linguists we reikuaird tu interpret dhe diskushuns and ei houst ov udhers hu we not sou ekspert.

.../...

Angulo de la Serĉemuloj.

De la enigmo eperinta en la Aŭgusta numero mi ricevis bonan solvon de Marie-Thérèse Roose, Roger Iserentant, Et. De Baets kaj Grég. Maertens. Ricevos unu premion por tri bonaj solvoj: Marie-Thérèse Roose, Roger Iserentant; por du bonaj solvoj: Grég.Maertens; por unu bona solvo: Carlos Callewaert kaj Et.De Baets.

Depost nun mi komencos tute novan konkursoserion. La regularo estas tre alloga danke al la bonvolemo kaj la klopodoj de la gvidanto de la fako "propagando". La ensendinto de unu bona solvo ricevas 5 poentojn. Se la solvo ne estas bona aŭ malkompleta, la ensendinto tamen ricevas unu poenton. (inter krampoj dirite: mi estas certa ke la koramiko de Kie Tedat depost nun ankaŭ ensendos solvojn...kun unu vorto!)

Tuj kiam oni havas 5 poentojn oni povas akiri premion sed oni rajtas ŝpari la poentojn por poste akiri pli belan premion.

Jen listo:

5 poentoj - premio: unu libreto el la serio de pacifistaj verketoj.
10 " - " : bibiklo flago.
15 " - " Se aŭskultas la animo.
40 " - " E° in een doosje BAKKAR.
40 " - " "Kompleta gramatiko kaj vortfarado" Fruictier & Greenkamp.

Kaj ankoraŭ! por la konkursanto kiu la unua havos 5 bonajn solvojn estas premio de 50 fr. Ĉu tio ne estas alloga ?

La solvoj devas esti ensenditaj la 20an de ĉiu monato ĉe samideano Carlos Callewaert, Genthof 31, Brugge, en fermita koverto.

De tempo al tempo mi publikigos du enigmojn en unu numero kaj tiam ĉiufoje, krom la kutimaj enigmoj estos unu komika, stranga enigmo.

Do ĉiuj kuraĝe kaj entuziasme al la laboro kiu profitos al vi tiom multe ankaŭ rilate al la lingvokono.

E N I G M O.

La solvo konsistas el 53 literoj. Ĉiu nombro signifas unu literon.

48, 24, 45, 17, nomo de monato.
1, 40, 16, 53, grava meblo.
11, 17, 32, 41, 8, doma besto.
30, 9, 5, 35, 13, 51, 35, 42, nomo de tago.
43, 21, 49, 29, ĉefparto de la korpo.
2, 23, 18, 28, 4, 33, 38, nomo de mondparto.
46, 27, 36, 3, 34, lampeto sur la ĉielo.
50, 14, 39, 42, staranta akvo.
19, 31, 23, 44, 25, 15, 8, parto de la monato.
52, 47, 6, 14, 32, 29, la sinjoroj tenas en la buŝo.
7, 12, 26, 20, 38, estas sur la homo.
10, 8, 348, 18, 13, 53, nomo de sezono.
39, 37, 44, 22, 34, trinkilo.

1 - 53, deklaro de francaj scienculoj pri Esperanto.

La solvo:

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11
12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25
26 27 28 29 30 31 32 33 34 35 36 37 38 39
40 41 42 43 44 45 46 47 48 49 50 51 52 53

(-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-) (-)

(Sekvo de paĝo 6).

If ei yuniversal languij egzisted, dhies diskushuns kud bie held raund ei teibl hwer everi bodi kud understand hwot everibodi els had tuu sei widhaut having to rizort tu individyuol interpreterz tu faind aut whot dhe mater woz ool abaut.

An instans ov dhe droobak ov dhis diskripshun ov kros-interpretashun and dhe misunderstanding dhat kan dherbai araiz iz dhe fakt dhat ai fornd part ov ai komishun dhat wuns went tuu Paris tuu interviu Mr.Jouhaux, Mr.Dobbie, M.P., woz wun ov aur group.

Wun ov dhie answers woz sou inkorektli interpreted dhat ai had tuu step in -ai woz not dher az an interpreter- and eksplein tu Mr.Dobbie and dhie interpreter, dhat hiz understanding ov dhie anser woz toutali inkorekt.

And dhus internashunal misunderstandings ariz.

Bai dhie yus ov an internashunal languij yuniversali spouken sutsh ei misunderstanding kuud never okur."

Jes, bone, tute bone. Sed ĉu la Right honourable Mr.Follick pensas ke la afero estas tiel simpla ?! Ĉu li pensas ke per tio li kapablas anstataŭi la genian verkon de Dr.Zamenhof ?! Kaj tio venas de iu kiu estas doktoro, kaj parlamentano ! Nur unu bonon havas la afero: ke denove iu popolgvidanto vidas ke la situacio ne plu povas daŭri tiamaniere kaj ke la nacioj devas uzi universalan lingvon. Sed cetere... ni esperas ke ne multaj estos tiel azenaj kredi en lia solvo. Nia vicprezidanto demandis la opinion de unu Anglo kiu diris vere Angle: "ĝi estus por mi perfekte komprenebla...se mi havus la Anglan tekson" (!)

Feliĉe. Du tagojn poste nia Samideano A.Fisher jam donis bonegan respondon al tiu Dr.Follick en la sama gazeto.

"La neceso de internacia lingvo estas plej bone konstatata de Dr.Follick en la "Daily Herald". Sed kiel tiom multe da aliaj li ne vidas ke aliaj nacioj estos neniam konvinkitaj al alpreno de ia formo de la Angla lingvo, ĉu Basic, ĉu reformita ĉu pura, kiel la internacia lingvo. Se la Sovet-Unio proponus la Rusan kiel internacian lingvon, ĉu Dr.Follick akceptus eĉ unu momenton ? Do kial li imagas ke la Rusoj akceptus la Anglan ? La internacia lingvo de la estonta mondfederacio devas esti: 1) facila por lerni ĝin; 2) logika (ne stultaj malregulaĵoj kaj ne dialektoj); 3) elasta (ebleco por esprimi plej etajn nuancojn de pensado sen danĝero de konfuzo); 4) belsona (krutaj lingvoj kiel la Germana aŭ siflaj lingvoj kiel la Angla estos ne akceptataj de aliaj nacioj); 5) neŭtrala (plej grava kondiĉo).

La sola ebla lingvo kiu kontentigas tiujn postulojn estas Esperanto kiu pruvis sian praktikan eblecon dum la pasintaj 50 jaroj en ĉiuj landoj de la mondo".

Ni gratulas Samideanon Fisher kiu tiel rapide, tiel trafe, tiel koncize kaj tiel bone klarigis la menson de la multnombrega legantaro de la Daily Herald.

ççç

Paĝo de la Esperanto movado.

Ni vidas ke ĉie la Esperanto movado restariĝas. Ĉie kursoj estas redonataj kaj okaze reaperas artikoloj en iuj ĵurnaloj. Ni menciu ekz. la bonegan kontraŭargumentadon de S-ano Fisher kontraŭ Angla lingvoimperialismo en Daily Herald de 29-VIII-'45. Oni jam reaŭdas Esperanton en la radio-aparato. Brazilio donas la bonegan ekzemplon. En Francujo Rijssel kaj ĉe ni Fortrijk. Ni esperu ke ili ĉiam disponos pri interesa materialo por disaŭdigi.

Venas nun ankaŭ al la lumo ke ankaŭ en Francujo kaj eĉ en Germanujo oni laboris en la mallumo. "Amerika Esperantisto" JUL.-Aŭg.1945 raportas pri la fiera kaj kuraĝa konduto de la nun mortinta Admiralo Rollet de l'Isle. La sama numero rakontas pri seniluziiga intervjuo de Amerika E-isto kun Germana esperantistino sed aliaj fontoj jam rakontis al ni pri fidela konduto de Germanaj samideanoj. Sed daŭros ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol ni estos plene informitaj. Ankoraŭ la sama numero estas tamen, laŭ nia scio, malbone informita kiam ĝi diras ke la Italujo de Mussolini kontraŭagadis Esperanton. Ni ankoraŭ havas en memoro la tre belajn Esperanto eldonojn de E.N.I.T.(Ente Nazionale per le Industrie Turistiche), la brilan kongreson de Romo - je kiu okazo oni tiam en Esperantujo rakontis ke la plej altaj instancoj invitis la esperantistaron -la ĵurnalon "L'Esperanto"; ni ricevis ĉiumonate la programan libreton de radio-disaŭdigoj kaj fine ni posedas ankoraŭ belegan turismolibron pri Romo eldonitan en 1935. Ankaŭ ĉie reaperas Esperanto revuoj. .../...

Ankoraŭ ĉiam la sama numero de Amerika Esperantisto ĉiras ke ĝi ricevis: "Interna Bulteno" el Palestino; "La Verda Flamo" el Maroko; "Per unu voĉo" el Sud-Afriko; "Heroldo de Ĉinio"; la T.J.O. Bulteno "British Esperantist"; "Argentina Esperantisto"; "Irlando vokas"; "Renovigo" el Meksiko; "Pernambuco Esperantista"; "O Brasil Esperantista"; "Esperanto Internacia" do, oni vidas, ĉie. Verŝajne la neŭtralaj landoj daŭrigis aperon de siaj revuoj kaj ni scias ke en Nederlando jam reaperas du kaj baldaŭ venos aliaj.

Oni havas la impreson ke multaj, nun ankaŭ en la Anglo-Saksaj landoj, konvinkiĝas pri la internacia lingvoj-malfacilaĵo. Tion pruvas jam la fakto ke gazeto kiel "Daily Herald" allasas artikoletojn pri tio, ke Angla Parlamentano en la parlamento defendas iun solvon (= tiu solvo ridindega finfine tamen profitos al Esperanto), ke multaj alitranguloj subtenis Basic, ke "Vital Speeches" (= revuo simila al "choix" kaj al "'t Venster" kiu publikigas la plej interesajn artikolojn el multegaj gazetoj) aperigis pri tiu temo artikolon de la eminentulo Dr.Wilhelm Solzbacher. Rilate al tio ni forte rekomendas la tri artikolojn de la sama intelektulo aperintajn en la tri lastaj numeroj de "Amerika Esperantisto".

Tie-ĉi en Flandrujo "Flandra Esperantisto" daŭrigas la pezan laboron interesigi la popolon por Esperanto. Ni pensas ke finfine ĝi sukcesos ĉar antaŭ la milito ĝi sukcesis. Bedaŭrinde estis ke tiom malmulte da junaj intelektuloj partoprenis en ĝi. Ĉu tio baldaŭ plibonigos ? Inter Katolikoj la F.U.K.E. povas kompreneble fari multe da bono. Sed ni demandas al ni kial oni metis en la lasta numero de "Flandra Katoliko" (Juli-Aug.1945) Anglanopinion pri la reĝa afero en Belgujo. Tio havas absolute ne rilatojn kun Esperantismo, ankaŭ ne kun Katolika Esperantismo. Estas vere ke en nia lando, kaj verŝajne ĉie, la politiko faras precipe du aferojn: 1) multe detrui 2) akapari ĉion kaj ĉiun. Tio estas tiel ĝenerala ke eĉ "Flandra Katoliko" ne evitas ĝin. Sed tio estas danĝera. Ni volas kredi ke preskaŭ ĉiuj Katolikoj kaj Flandroj estas favoraj al la reĝo. Do pro tio "Flandra Katoliko" certe ne perdos anojn. Sed la fakto ke ĝi allasas plitiktemajn skribaĵojn estas dangera en si mem. Kiam oni faras unu paŝon sur tiu vojo, kie oni haltos ?

En Valonujo ni nenion aŭdas pri Esperanto. Antaŭ la milito la movado tie estis preskaŭ ne ekzistanta.

8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8=8

B O M B O N A Ĵ O.

La nekonsolebla vidvo.

-Ho, Sinjoro, ĉu vi ne vidis ŝin?Aŭ vi, Sinjorino, aŭ vi, fraŭlino ?
-Kiun ?
-Nu, mian edzinon ?
Kaj denove la viro ekĉirkaŭiris, sur manoj kaj piedoj por ke li povu manserĉi ĝin sub kaj malantaŭ la benkoj.

En la tuta atendo-salono nenio estis ankoraŭ rapidema. Ĉiuj staris ĉirkaŭ la serĉanta homo.
-"Ĉu vi perdis vian vojaĝbileton"?demandis servema biletttruisto.
La homo levis la kapon, restante genufleksanta kaj respondis:
-"Ne, sed mia edzino"!
-Ĉu via edzino perdis vian bileton?
-Sed ne, mi perdis mian edzinon.
Tiam la viro elprenis sian naztukon kaj plorĝemis senespere. La rigardantoj plenkompate observis la dolorigan scenon kaj interŝanĝis komprenigrigardojn indikante:
ĉu li perdis sian edzinon, mi ne scias, sed tamen ke li certe perdis la saĝon.
La stacidomestro alproksimiĝis por fari raporton antaŭ ol transdoni la mizerulon en la manoj de la polico.
-He, Sinjoro,vi ne bezonas ĉagreni tiel pro ĝi.Ĉu estas longtempe, post kc vi perdis vian edzinon ?
Per krajono en la mano, la stacidomestro atendis la respondon.
La viro balbutis:
-Antaŭ kvin minutoj, mi ŝin enpoŝigis.
-Kiun ?
-Nu, mia edzino, mi diris al vi!
-Denove la viro ekserĉis sub la benkoj, dum la stacidomestro nek helpebla, nek konsilebla, fermis sian notlibreton.
-Ĉu ŝi foriris de vi, sinjoro?-demandis kompatanta sinjorino.
-Depost hieraŭ, kiam oni ŝin transdonis al mi, mi tenis ŝin ĉiam varme en mia surtutpoŝo, escepte en la restoracio, kie mi metis ŝin ĉe mi sur la tablo.

(Daŭrigos.)